# Jura Semajno

Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro 4 : 2025


## APELACIA JUĜO EN USONO KONTRAŬ TUJA FORKONDUKO DE ENMIGRANTOJ




Ĉi-semajne la Apelacia Kortumo de Usono rifuzis peton de la registaro, celanta etendi la programon pri tujaj forkondukoj al tutaj usonaj ŝtatoj, kaj ne nur al landlimaj zonoj. Unua-instance juĝistino Jia Cobb deklaris, ke tiu etendo malobservis la leĝajn garantiojn de enmigrantoj, kiuj ne povis esti tuj forpelitaj, male oni devus atendi la finon de juĝa proceso. Escepto al tiu normo okazas se enmigrantoj estis haltigataj ĉe landlima zono, tiam enmigranto povas esti tuj forkondukita, se oni ne pruvas, ke oni loĝis en Usono dum la du lastaj jaroj. Do, la usona administracio apelaciis kaj nun la kortumo juĝis (2 voĉoj kontraŭ 1), ke la etendo de tiu programo en la tutan landon, kaj ne nur ĉe landlimaj zonoj, prezentas eblajn riskojn pri eraraj tujaj forkondukoj.

Diferenca opinio proklamis juĝistino Neomi Rao. Ŝi proklamis, ke juĝa povo ne povas miksiĝi en la administracian kompetenton por reguli la migrantan fluadon. La mekanismo pri tuja forkonduko ekzistas en Usono depost la jaro 1990, tio okazas kiam enmigranto estas haltigata ĉe landlima zono. Tamen nun, usona administracio decidis etendi tiun mekanismon en la tutan landon. Malgraŭ la ĵusa juĝo, la afero ankoraŭ ne estas definitive solvita, pro la fakto, ke la apelacia kortumo diskonigos la tutan juĝon en decembro. Tiam oni difinos ekzakte la kompetentojn de administracio kaj juĝistoj en ĉi tiaj aferoj.

# *Vorto de la Semajno*

## DEPONI

1. Lasi ĉe iu valoraĵon gardotan.

2. Konfidi ion -ĝenerale monon- al financa organizo, ordinare kontraŭ interezo kaj sub la kondiĉo, ke oni ne reprenos ĝin sen antaŭavizo.

**DEPONAĴO, DEPONITAĴO**: tio, kion oni deponis.

**DEPONANTO:** tiu, kiu deponas.

**DEPONPRENANTO:** tiu, kiu ricevas kaj gardas deponaĵon.

**DEPONATESTO:** dokumento kiu certigas la deponon, ĝi utilas por reakiri la deponaĵon.

**DEPONEJO:** loko, kie oni povas deponi aĵojn.

Sinonimoj: *gardi, konservi,*

*La respondeculo de la akcidento deponis ĉe la juĝejo la sumon de mil eŭroj por garantii la pagon de eblaj riparoj.*

## *Nova numero de JURA TRIBUNO INTERNACIA baldaŭ aperonta.*

Atentu ĉiuj interesitoj publikigi artikolon sur nia revuo! Antaŭ la fino de la kuranta jaro aperos nova numero de ***JURA TRIBUNO INTERNACIA*****.**

Do, vi ankoraŭ povas sendi al ni artikolon, eseon, raporton, informon pri juraj temoj en esperanto. Bv. fari tion antaŭ la 5-a de decembro.


**INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO**

**www.esperantojuro.org**

**jurista@esperanto.ac**